

Eĥnatono: Sunohimno

tradukita de Wera Blanke



Bela estas via leviĝo
ĉe la horizonto de la ĉielo,
vivanta Atono, komenco de l' vivo.
Kiam vi aperas en la oriento,
vi plene plenigas la landon
per via beleco.
Estu vi bela, granda, brila kaj alta,
la plej Supera de la tuta lando.

Viaj radioj ĉirkaŭas la landojn
laŭ la maniero, en kiu ĉiuj el ili
estis kreitaj de vi.

Vi estas Reo, vi ilin ĉiujn
– venkinte ilin – alportas al via filo amata.
Kvankam vi estas for, viaj radioj surteras.

Malgraŭ via alto super ili
viaj spuroj ja estas sur via vojo.

Vi subiras ĉe l' okcidento
kaj la tero ĝishorizonte
estas en plena mallum',
en la stato de morto.

La dormantoj estas en la kabano,
vualitas iliaj kapoj.

Neniu okulo vidas alian.

Rabitas iliaj havaĵoj,
kvankam subkape, kaj ili ne scias.

Ĉiu leono elvenas el sia kavaĵo,
ĉiuj serpentoj ja mordas.

Mallumas fajrujo kaj silentas la ter'.

Li, kiu kreis ilin,
ripozas ĉe sia horizonto.

Tagiĝe leviĝu je l' rando de l' ĉielo
kaj lumu Atone dum tago.

Vi forpelas malhelon,
se vi donacas viajn radiojn.

Ambaŭ landoj festas,
maldorme starantaj sur ambaŭ gamboj.
Ili estis starigitaj per vi.
Puraj estas iliaj korpoj
kaj ili ricevas vestaĵon.
Ambaŭ brakoj estas preĝe levitaj
ĉe via leviĝo.
En la tuta lando ili faras sian laboron.

La brutaro kontentas
kun sia herba paŝtejo.
La arboj kaj plantoj verdiĝas.
La birdoj flirtadas en sia nesto.
Iliajflugiloj estas glorante levitaj al vi.
Ĉiu besto saltas sur siajn kruojn.
Ĉiuj, kiuj flugas kaj alteriĝas,
ili vivas, se vi prilumas ilin.

La ŝipoj veturas laŭflue
kaj ankaŭ kontraŭe.
Ĉiu vojo malfermas, ĉar vi ĝin heligas.
La fiŝoj en la rivero
suprensaltas antaŭ vi.
Viaj radioj estas en la
plejinterno de la oceano.

Vi kreas la fetojn en la edzinoj
kaj la korpajn sukajn en la homoj.
Vi donas al la filo
en la korpo de sia patrino la vivon,
vi trankviligas lin, por ke li ĉesu ploradi.
Vi – nutristino en la korpo de la virino.

Vi donas spiron
por vivigi ĉiujn, kiujn vi kreis.
Kiam la bebo forlasas la korpon,
por enspiri la tagon de sia naskiĝo,
vi plene malfermas ĝian buŝon.
Vi zorgas pri ĝiaj bezonoj.

La kokido en la ovo pepas,
vi donas spiron al ĝi
en la ovointernon, por vivigi ĝin.
Vi faris ĝin perfekta, tiel ke
ĝi povas rompi la ovon
kaj foriri kaj pepi je sia tempo.
Ĝi iras sur siaj kruroj, ĝi tie elvenas.

Multspeca estas, kion vi kreis,
kvankam ĝi estas kaŝita antaŭ ni.
Ununura dio, al kiu neniu egalas.

Vi kreis la teron laŭ via volo,
kiam vi estis sola: la homojn,
ĉiujn gregojn, ĉiujn brutojn kaj ĉion,
kiu estas sur tiu ĉi tero,
kiu iras per kruroj, kiu estas surĉiele
kaj flugas per siajflugiloj.

La fremdlandoj Sirio kaj Nubio
kaj la lando egipta –
al ĉiu vi donas sian lokon.
Vi zorgas pri iliaj bezonoj.
Ĉiu unuopulo ricevas sian nutraĵon,
kaj ilia vivotempo estas kalkulita.

La langoj diferenciĝas laŭ la lingvoj
kaj same la karakteroj kaj haŭtoj.

Vi faris tiom diversaj
la loĝantojn de la dezerto.

Vi kreis la Nilon en la subtero
kaj alportas ĝin laŭ via volo,
por vivteni la regatojn, kiel vi ilin kreis por vi,
ho mastro de ĉiuj el ili.

Vi ja penadis pri ili,
ho mastro de l' tuta lando,
kiu leviĝas por ili.

Ho sundisko de la tago,
granda je elradiaĵo
en ĉiu fremda kaj fora lando,
vi faras ilin vivantaj.

Vi metis Nilon ankaŭ en la ĉielon,
por ke ĝi descendu al ili,
por ke ĝi ondu al la montoj
same kiel la oceano,
por akvigi iliajn kampojn
en iliaj loĝlokoj.

Perfektas via esenco,
ho mastro de l' eterneco.

La Nilo en la ĉielo,
ĝi estas por la fremduloj
kaj por la brutoj de ĉiu lando,
irantaj surkrure.
La vera Nilo tamen,
ĝi fontas el la subtero al Egiptujo.

Viaj radioj nutras ĉiun landon.
Kiam vi leviĝas, ili vivas,
kaj ili atingas vin.

Vi faras la jar-sezonojn,
por krei viajn verkojn.
La vintro havigos al ili frisketon,
varmegon gustumos ili somere.
Vi kreis la foran ĉielon,
por tie leviĝi –
kaj por rigardi, kion vi kreis,
kiam vi estis tutsola.

Leviĝu en via formo de vivanta Atono –
leviĝanta, brilanta, fora, proksima.

*La urboj, la vilaĝoj, la agroj, la riveroj –
ĉiu okulo ekvidas vin.
Vi estas Atono en la tago,
la estro de l' lando
unike farita de vi.*¹

¹ Originalo difektita, teksto ne certa, propono de A. K.

Vi estas en mia koro,
kaj neniuj aliaj ĉeestas,
kiu vin konas.

Malfermu la okulojn al via filo
Nefer-ĥeperu-re Ŭa-en-re.¹
Vi lasas lin preĝi laŭ via maniero
kaj per via forto.

La tero estas en via mano,
kiel vi estis kreinta ĝin.
Kiam vi leviĝis, ili vivas.
Kiam vi subiras, ili mortas.

Ĉar vi estas la vivotempo, vi mem.
Pere de vi oni vivas.

La okuloj estas fiksitaj
al via beleco, ĝis kiam vi subiras.
Ili demetas siajn laborojn,
kiam vi subiras en okcidento.
Kiam vi leviĝas,
la fortoj² de l' reĝo kreskas,
mi rapidas sur ĉiuj piedoj.

¹ La Trona Nomo de Eĥnatono, signifanta: „Belas la formoj de Reo, unikulo de Reo“

² Originalo difektita, teksto ne certa, propono de A. K.

Ekde via kreado de l' tero,
vi portas ĝin alten
por via filo, kiu fontas el via korpo;
li estas la reĝo de Supra
kaj Malsupra Egiptujo – li vivu en justo –,
la mastro de Ambaŭ Landoj,
Nefer-ĥeperu-re Ŭa-en-re,
filo de Reo – li vivu en justo –,
la mastro de l' kronoj, Eĥ-en-Atono,
grandulo en sia vivotempo;
kaj por lia Granda Reĝa Edzino, lia amata,
la mastrino de Ambaŭ Landoj,
Nefer-neferu-Atono¹ Nefertito
– ŝi vivu por ĉiam kaj eterne.



Esperantigita de Wera Blanke 2014 laŭ la interlinia germana versio de la hieroglifa originalo el la tombo de Eje: www.astrodoc.net/andere/atonhymnus/hymnus.htm – laste kontrolita: 2016-05-23
Etaj variaĵoj kaj aranĝo: Albrecht Kronenberger 2016
Fotoj: Wikimedia Commons

¹ La Kromnomo de Nefertito, signifanta: „Belas la belecoj de Atono“